



FN PER ANC 47

Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL + TRIMONATA BULTENO

N° 62A (NOVA SERIO) N° 147A.

VINTRO 1983A.

REDAKTAS : JEAN GIBAUZ 28 RUE RAOUL DUFY 76600 LE HAVRE.

ELDONITA, EKSPEDITA DE :

UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE : C.C.P. : N°283 40 H ROUEN.

KOTIZOJ : Minimuma kotizo = 20 Fr. Subtena ek de 30 Fr.

Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno, sen membreco
= 20 Fr.

"La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj"

LENINGRADANOJ SALUTAS NORMANDAJN ESPERANTISTOJN

Feliĉa mi estis, kiam la komitato de mia fabriko decidis organizi vojaĝon al Leningrado.

Leningradon mi vizitis jam antaŭ 23 jaroj ! Mi ĉiam intencis reviziti ĝin sed forpasas rapide la tempo. Mi tiam konatiĝis kun esperantistoj kaj korespondadis dum kelkaj jaroj kun du samideaninoj kies adreson mi konservis kaj mi anoncis al ili mian baldaŭan viziton.

Leningrado estas belega urbo kun multaj vizitindaj muzeoj kaj monumentoj. En tiu ĉi artikoleto, mi ne intencas priskribi tiun urbon laŭ turisma vidpunkto, sed precipe insisti pri la gastemo kaj afableco de la tieaj esperantistoj.

De mia hotelo, mi telefonis al mia korespondantino por anonci mian alvenon. Tuj post tagmanĝo ŝi venis kun du aliaj samideanoj kaj ni kune vizitis urbon kaj muzeon pri rusaj pentraĵoj. Vespere ni estis akceptataj de esperantistoj studentoj. Pluraj dekoj da ili ĉeestis. Ĉiu prezentis sin. Mi estis la nura eksterlandano, sed alia samideano venis de pli malproksime ol mi : Vladivostok !

Rusoj parolas tre bone Esperanton kaj ni komprenis perfekte unuj la aliajn. Ni manĝis kelkajn dolĉaĵojn dum junuloj bone gvidis distran vesperon per skeĉoj, ludoj, kantoj kaj dancoj. Mi estis tre surprizata konstatike la dancado de anasoj estas ankaŭ tie konata. Rapide forpasis la tempo dum tiu ĉi distra vespero kun bonega etoso.

La sekvantan tagon, mi promenis kun mia korespondantino aĉetante varojn en magazenoj. Post akcepto de la sekvanta grupo de asocio de sovetiaj esperantistoj en domo de amikeco kaj, ĉu mi ĉeestis la esperanto-kurson kun trideko da lernantoj. Per rekta metodo kaj sen libro, Valerija instruis nian lingvon lerte kaj kompetente; mi ankaŭ demandis al la lernantoj.

.../...

Polycopié par le Groupe Espérantiste Rouennais.

Le Gérant : Pierre LEMARCHAND. - Dépôt Légal 4 ème trimestre 1983.

.../...

* 2 *

Mi pasigis la vesperon en la hejmo de Leningradanoj ĉe kiuj mi vespermanĝis. Ni tiel havis okazon diskuti libere kaj simpatie; ni disiĝis emocie post noktomezo.

Ĉiuj rusaj samideanoj petis de mi informojn pri la esperantista agado en nia regiono. Ili tre deziras ke la interurba ĝemeliĝo inter LE HAVRE kaj LENINGRAD estu pli efika kaj ebligu interviziton de delegacioj.

Leningradanoj estis feliĉaj akcepti Normandojn en sia urbo. Ni es-
-peru ke iam estos eble akcepti ilin en nia provinco.

Petro KIJO.

==:==:==:==:==:==:==

MIHAIL DUDIN, 1968.

TURNAS MIN MI AL ĈIUJ HOMOJ.
KIUJ LOĜAS EN LANDOJ DIVERSAJ,
POR LA VIV' DE L' EPOKOJ ESTONTAJ
NI ANONCU TUTLOKAN FESTON

TAGON SEN PAFO SUR LA TER' !

SE LA FESTO ESTOS SUKCESA
NIAJN FORTOJN NI POVCOS TRIOBLIGI
KAJ KONTRAKTI FIDELE POR PACO
KAJ POR HOMOJ DIVERSAJ ARANĜI

JARON SEN PAFO SUR LA TER' !

JARO SEN PAFO EL TAGOJ TRANKVILAJ
SEN TORTUROJ DE L' NOKTOJ KARCERAJ
KAJ JEN, FORGESINTE MILITOJN
NI KOMENCAS KONSTRUI EPOKON

EPOKON SEN PAFO SUR LA TER' !

KAJ LA TERO DISFLOROS BELEGE
KAJ ELIROS EL SANGA RONDO
NI FORGESOS IOM POST IOM
MORTIGI NIN RECIPROKE

HOMOJ ! ĈIO DEPENDAS DE VI !

Esperantigis el la rusa :
VITALIJ TITCV, 1980.

=====

NORMANDA KONGRESO ?
==:==:==:==:==:==:==

= J E S ! ! ! !

K I A M ? = 24A KAJ 25A DE H A R T O 1984.

K I E ? = B A Y E U X .

K I E L ? = INFORMOJ EN LA SEKVANTA BULTENO.

N O T U L A D A T O J N K A J P A R T O P R E N U !

=====

VIVO DE NIA NORMANDA UNUIĜO :

KOMITATA KUNVENO DE U.N.E. EN YVETOT : 04.12.82.

Dek personoj ĉeestas. La ĝenerala diskuto evoluas surbaze de la Interna Cirkulero 1982/I - jen kelkaj eltiraĵoj :

BULTENO : La maŝinon P. LEMARCHAND portos en Le Trait, kie N.E.B. estos presata, fare de K. DOMINGO, Gesoj BETTENCOURT Gilbert kaj Lemarchand. Estonte, la adresoj sur la banderoloj (por la bulteno n°148) estos pres-itaj komputile. Oni studas diversajn eblecojn de presado de novaj front-paĝoj.

KONTOJ : La kongreso en Etretat lasis bonhavan saldon de 610 Fr. La Havra Grupo, kiu disvendis surpriz-kovertojn tie, ĝiris al U.N.E. 400 Fr. La kasisto de la Normanda Federacio de U.F.E. ĝiris al nia kaso 300 Fr., kiel promesite en Etretat. Dankon al ili !

LEGOPROPONO : Kompilado de la ĝisdatigitaj adresoj de ĉiuj deputitoj kaj senatanoj de Normandio.

EKSPozICIO : Kompilado de listoj por projekto de aĉeto de valoraj libroj kaj dokumentoj, cele de facila prezentado okaze de prelegoj ĉie en Normandio.

LIBERAJ RADIO-STACIOJ : Radio Abel (Caen) regule elsendas en esperanto (parola kurso). Mallongaj prezentadoj en Le Havre kaj Rouen (Radio FMR).

GENERALA KUNVENO 83 : Sro ANGENAULT kaj NICOLAS pristudas eblecojn en la apudeco de Caen : Hérouville St Clair.

JUNULARO : K. DOMINGO, Gesoj POTTIER kaj la grupo en Yvetot organizos tie junularan renkontiĝon la 29.04 ĝis 01.05 : "Konvala Renkontiĝo."

KOMITATA KUNVENO DE U.N.E. EN LE HAVRE : 26.02.83.

Naŭ ĉeestantoj. Pritrakto de diversaj punktoj : estrara divido de la taskoj, cirkulanta biblioteko, bulteno (n°145 renkontis malfacilaĵojn por aperi, sekve, ĝi estis duobla 145/146), renkontiĝoj : en Le Havre Jarfesto 13.03 kun ĉeesto de deputito, du angloj kaj Tespa; en Yvetot Konvala renkontiĝo de la 29a de aprilo ĝis la 1a de majo kun partopreno de Malagaŝo, kaj Tespa.

Ĝenerala Kunveno : ĝi devus okazi en Hérouville St Clair, apud Caen kaj oni decidis pri la dato: 28a kaj 29a de majo.

KOMITATA KUNVENO DE U.N.E. EN GRAND QUEVILLY : 23.04.83.

Ok personoj ĉeestas.

BULTENO : Denove oni parolas pri "Commission Paritaire de Presse" : laŭ Sino Vincent, kelkaj numeroj kunportus la enskribo-numeron. Oni atendas informojn rilate al la presigo de frontpaĝoj. En N.E.B. 147 aperos poemo de Leningrada Samideano.

LEGOPROPONO : debato, interinformiĝo, agado por la estonta leĝopropono.

KASO : 4.478 Fr. : bona stato.

RAPORTOJ pri agado en diversaj urboj.

KONGRESO : informoj pri la organizaj laboroj kiuj iras kontentige, sed aliĝiloj ne venas rapide.

Bedaŭrinde, pro la nesufiĉe alta nombraro de aliĝintoj, la organiz-komitato de Caen/Hérouville devis nuligi tiun kongreson. Tion ĉiu ano de nia asocio bedaŭras. Tiu ĝenerala kunveno okazos la 24an kaj 25an de MARTO 1984 en BAYEUX. Informojn vidu en la venonta numero de Normanda Esperanto Bulteno.

KOMITATA KUNVENO DE U.N.E. EN LE HAVRE : 22.10.83.

Dek kvar personoj ĉeestas.

GENERALA KUNVENO : Ĝenerala pristudo de la plej oportuna epoko venigis al la konkludo ke ni devos celi al Oktobro. Sed por ĉi foje G.ANGENAULT kaj Y. NICOLAS informiĝis kaj proponas BAYEUX por la 24/25a de Marto,

.../...

$$0 + \frac{1}{2} + \frac{1}{2^2} + \frac{1}{2^3} + \frac{1}{2^4} + \frac{1}{2^5} + \frac{1}{2^6} + \frac{1}{2^7} + \frac{1}{2^8} + \frac{1}{2^9} + \frac{1}{2^{10}} + \frac{1}{2^{11}} + \frac{1}{2^{12}} + \frac{1}{2^{13}} + \frac{1}{2^{14}} + \frac{1}{2^{15}} + \frac{1}{2^{16}} + \frac{1}{2^{17}} + \frac{1}{2^{18}} + \frac{1}{2^{19}} + \frac{1}{2^{20}} + \frac{1}{2^{21}} + \frac{1}{2^{22}} + \frac{1}{2^{23}} + \frac{1}{2^{24}} + \frac{1}{2^{25}} + \frac{1}{2^{26}} + \frac{1}{2^{27}} + \frac{1}{2^{28}} + \frac{1}{2^{29}} + \frac{1}{2^{30}}$$

La ĝenerala kunveno okazos en Hejmo de Junaj Laboristoj. Distra parto studata.

NORMANDA ESPERANTO BULTENO : P. Lemarchand zorgos pri la venonta bul-
-teno (147a). Por la venontaj la stencilojn tajpos J. GIBAUx, eldonos
ĝin K. DOMINGO kaj familio BETTENCOURT (eldono antaŭvidita por Januaro)
SLIPARO : Verkado de revoka letero fare J. GIBAUx, sendado al la perso-
-noj kiuj ne pagis antaŭ 1981 fare de K. DOMINGO.

VENONTA ESTRARA KUNVENO : Fine de februaro 1984 en VER sur MER (14) ĉe
gesinjoroj ANGENAULT. ALvoko aperos en la venonta bulteno.

KIE _ ONI _ LEGAS _ NORMANDAN _ ESPERANTO _ BULTENON

Vi trovos ĉi sube la lokojn kie samideanaj familioj ricevas N.E.B.
La cifero inter krampoj indikas la nombron de adresoj en la urbo.

14 - CALVADOS : Bretteville sur Odon (1) - Caen (20) - Colombelles (1)
Epron (1) - Esquay s/Seulles (1) - Glos (1) -
Henneville (1) - Hérouville St Clair (2) - Honfleur (2) - Lisieux (12)
Livarot (4) - Mathieu (1) - Mesnil Benoist (1) - Trévières (1) -
Trouville s/Mer (2) - Ver s/Mer (1) - Vire (5).

27 - EURE : Bernay (2) - Bonneville Aptot (1) - Breuilpont (1)
Cormeilles (1) - Evreux (2) - Gaillon (1) - Les
Andelys (11) - Thilliers en Vexin (1) - Fontaine la Soret (1) - Pacy
s/Eure (1) - Parville (1) - Pont Audemer (1) - Vernon (3).

50 - MANCHE : Bréhal (1) - Cherbourg (1) - Granville (1) - St Georges
de Rouelley (1) - St Hilaire du Harcouët (1) - Saint
Sanes (1) - St Vaast la Hougue (1) - Sartilly (1) -
Sourdeval (1) - Tessy s/Vire (1).

61 - ORNE : Alençon (3) - Domfront (5) - La Ferté Macé (2) -
Laigle (1) - Messei (1) -

76 - SEINE MARITIME : Bihorel (4) - Bouttencourt (1) - Bouville (2) - Bois Guillaume (4) - Bolbec (1) - Darnétal (2) - Elbeuf (1) - Eu (1) - Fécamp (3) - Grand Quevilly (11) - Heuqueville (1) - Le Havre (27) - Les Loges (1) - Le Trait (1) - Mesnil Esnard (2) - Montivilliers (2) - Mont St Aignan (6) - Neufchatel en Bray (1) - Dissel (1) - Pavilly (1) - Rouen (23) - St Etienne du Rouvray (1) - St Jean du Cardonnay (1) - St Maurice d'Etelan (1) - Sotteville les Rouen (5) - Yvetot (14).

EKSTER NORMANDIO : Al 12 francaj urboj.

EKSTER FRANCIO : Al 5 urboj (4 landoj).

KROME : A1 25 Esperanto Asocioj (el kiuj 3 eksterlande).
A1 10 Ne esperantistaj Organismoj.

SUME : Calvados (57) - Eure (27) - Manche (10) - Orne (12)
Seine Maritime (118) - = entut. ADRESOJ.

DIVERSAJ ADRESOJ

276 BULTENOJ

[illegible]

POR 1984, LA BULTENA TEAMO, KAJ VIAJ ESTRARANOJ, DEZIRAS AL VI BONEGAN JARON : SANON, FELIÇON, ĜOJON, PACON, POR ĈIUJ !

* * * * *

JEN KIEL ONI AMIS DUM LA FERA (XA-XIA) KAJ LA ORA (XIIA-XIIIA) JARCENTOJ

Kiam la feŭda sistemo starigis proviantan kamparsocion kaj militistan defendsocion kiel interkompletigajn vivogangojn, ina sorto povis esti nur ĉu edzino kamplaborista, ĉu edzino nobelula. En fermita universo vivas ĉi-lastaj, de sia servistino ĉirkaŭata; ŝi spinadas, kudradas, brodadas, en okazo de bezono flagas la venditojn. Nur pala, ne preciza figuro ŝi aspektas, meze de vira socio. Nur preteŝkure profiliĝas fianĉinoj aŭ edzinoj en ĝestoj, kie ili ludas ĉion virinstigan, reblovante la fajron de l'kuraĝo, aŭ duonigante la krenikon de sovaĝa atakanto. En eposoj, veraĵ kavaliroj alprenas malestiman sintenon al erotikajoj.

En kampardometoj kaj kastellaborejoj, inoj teksadas kaj ŝpinadas laŭ-ritme de siaj tolkantoj; en sennomaj popolmuzikaĵoj ili prikantas fi-delecon, esperojn, amdramojn. Pere de naŭva poezio, inoj gardas la ti-aman civilizacion kaj ties esencajn viv-valorojn. Iom post iom polur-iĝas la sentojn.

Tial, kiam la eklezio ekdirektas kavaliran batalemon al protektado vidvina kaj orfa, ambaŭ influoj kuniĝas kaj aŭroras nova epoko.

Amo al festoj kaj lukso el oriento deveninta enpenetras okcidenten. La batalejon oni enpaŝas nun honore al la damo, je kies piedoj oni am-sopiras. La vorto "omaĝo" (origine subiĝo de viro al viro) aliĝas al subiĝo de viro al virino. Kruda, nedaŭra amo cedas la lokon al kor-batiga sento. Aŭtenta amanto aŭ ĉerpas superan ĝuon el propra doloro. Ina korpo estas perceptata kiel videbla juvelujo nevideblajn valor-aĵojn entenanta. En Provenco notblas la kutimo, ke geamantoj unua-foje tranoktantaj kune interkonsentite seniĝas je amorado.

Tre malofte oni elparolas la nomon de la mistera elektitino, foje jam edziniĝinta. Tiaspeca estis trobedoro Catalan, en apudpariza ar-baro murdita, kiu sekvis Parizen la setontan edzinon de Ludoviko la naŭa. La fama romano pri Tristan kaj Yseult ne estas alio, ol eŭropa mito pri adulta pravigo, ĉar la erare englutita amtrinkaĵo simbolas ekskuzon al ama pasio de geedzeca ligo liberiĝinta. En kortego de Marie de Champagne, oni starigis la demandon, ĉu vera amo povas esti-iĝi inter geedzoj, kaj nee Maria respondis.

Ĉu fino de kristana civilizacio? Ĉu komenciĝo renesanca sur paga-naj valoroj bazita?

Simone BONIOL

(daŭrigota).

LA NACIA ESPERANTO MUZEO: A. LEGRIST (VIRE) filmoj. La muzeo enhavas ankaŭ verkojn sciencajn, religiajn, por-

En la komenco de majo, mi vizitis kun tre granda intereso tiun ĉi Mu-zeon kiu situas en GRAY (Haute Sa-ône), ĉarma urbo kuŝanta 50 kilo-metrojn nordoriente de DIJON. La muzeo nun okupas 8 grandajn ĉambrojn kaj en venonta decembro instaligos en belegan trietaĝan domon en la centro de l'urbo. La muzeo estas sub-venciata de la urbestro.

Ĝi enhavas imponan kvanton da lite-raturaj verkoj tradukitaj aŭ ori-ginalaj. Oni tie ĉi trovas ankaŭ centojn da esperanto revuoj, diskoj

infanajn literaturaĵojn kaj ku-riozajn esperanto-dokumentojn. (inter kiuj estas afiŝo invitanta al la unua universala kongreso en 1905).

Tiu ĉi tre rimarkinda, nepre vizita muzeo estas la ellabo-raĵo de Sro Géo JUNIER, ege vi-gla esperantisto el GRAY. Al li oni ankaŭ dankas la ĝemeligon de la esperantista grupo de GRAY kun tiu de OBERKIRCH (Federacia Respubliko - Germanio).

Ankaŭ multaj neesperantistoj vizitas tiun belegan muzeon.

NIA VIVO EN LE HAVRE :

MONATAJ KUNVENOJ :

NOVEMBRO 82 : Silvia enkondukas la temon : "Kodo kaj Komunikado". De antaŭ pli ol 5000 jaroj, la homoj notis siajn pensojn. Entranĉita sur argilaj tabeloj, aŭ pentrita sur papero, skribajo estas la plej fabela inventaĵo de la homaro. Depost la pasinta jarcento, la plej malnovaj skribaĵoj povis esti komentitaj. Ili devenis el ambaŭ ligitaj per komerco civilizacioj de Egiptio kaj Mezopotamio. Ili preskaŭ samtempe inventis skribaĵon je la fino de la IV jarmilo. En Mezopotamio, ĉirkaŭ 3300 jaroj antaŭ Kristo, estis bildoskribitaj unue librokontojn. Baldaŭ la bildoj unuformiĝas kaj multobliĝas. Ne nur uloj sed agoj estas simboligitaj. Ab-stak-teco estas baldaŭ esprimita : reĝoj kaj religiuloj arkivigas tekstojn kaj leĝojn. Dum tri mil jaroj, multnombraj dokumentoj estas registritaj en sumera kaj akada lingvoj. (internacia tiama lingvo). La Fenicioj adoptas fonetikan skribon, kaj baldaŭ estiĝas la unua alfabeto. (Byblos 1500 antaŭ K.) Tiu praa alfabeto estas disvastigata laŭstrande de Mediteraneo. Araboj adoptis ĝin 500 antaŭ Kristo.

DECEMBRO : Paŭlo MARY pritraktas la temon "Abundo postulas Disdonan Ekonomion". En niaj industriigitaj landoj pro la teknika progreso, kreskis samtempe produktado kaj senlaboro. Abundo neigis la profiton kaj nia kapitalista ekonomio ne plu povis funkcii. Tion antaŭvidis la usona verkisto Edward Bellamy jam fine de la 19a jarcento. Socikreditanoj de Britio propagandas "Abundecan" teorion. En Francio, dum la granda krizo (1929 milito) Jacques Duboin ankaŭ analizis la problemon kaj proponis sian solvon "Disdonan Ekonomion". Ĉu utopio, ĉu genia ideo ?

JANUARO 83 : En nia epoko, oni multe parolas pri la ekster-teranoj : ekzistas pluraj teorioj kies starpunkto estas ĉiam iu kontakto - vera aŭ ne - de tiuj estuloj pli aŭ pli strangaj, kun kelkaj teranoj : tiuj ĉi, sinceraj aŭ malsinceraj, ekkomencas propagendi por konfirmi la kontakton kaj la diversajn sekvaĵojn.

Post enketo, nia amikino N. PELTIER elektis paroladeti al ni pri la teorio de Raël. Tiu viro franca, kies vera nomo estas Claude Vorillon, naskiĝis je la 30a de Septembro 1946. Li estis ĵurnalisto kiam la "afero" okazis : la 13an de Decembro 73, kiam, promenantе ĉe la vulkano "Puy de Lassolas", li renkontis en la kratero, tiun tagon, unu ekster-tereanon, pli precize unu "Eloha" (plurale "Elohim"). Ili re-troviĝis seninterrompe dum septagoj. La Eloha nomis nian samlandanon "Raël" kaj konfidis al li mesaĝon kiu raportas pri antaŭ tre longe okazintaj eventoj, kiuj riskas okazi dum la venontaj jaroj. Tiuj mesaĝoj estis skribitaj, pere de Raël en verko "La libro kiu diras la Veron". Notinde ke tiu verko ekzistas en esperanto-traduko. Jen kelkaj ekstraktaĵoj : pri la vorto "Elohim", ĝi estis malĝuste tradukita en iuj bibliojoj per la vorto "Dio" sed ĝi signifas en la hebrea lingvo "Tiu kiuj estas venintaj el la Ĉielo"... La planedo de la Elohim situas je unu lumjaro ĉirkaŭ kaj ni la teranoj bezonus 90 000 jarojn por ĝin atingi per niaj nuntempaj kapabloj. Ili atingas nian teron en du monatoj je la rapido de iuj radioj sepoble pli rapidaj ol la lumo.....

FEBRUARO : "Patriarkeco kaj Matriarkeco" : J. GIBAUD skizas historion de la familio, ĝian evoluon. Laŭ Engels, la edzeco transiris de la sovaĝa stato al la civilizita laŭ tri etapoj. 1) laŭ grupoj 2) kolektive, sed en paroj 3) fine, laŭ monogamio; kaj li komentarias "Monogamio, submetiĝo de unu sekso al alia, estigas konfliktojn : ĝi estas la unua antagonismo de klasoj kiu aperas en la historio, kiel opri-mado de la virina sekso fare de la vira sekso..." Ekstudo laŭ la juroj kaj franca, poligamio (plur-edzeco) kaj poliandrio (plur-ekzeco). Pluraj rektaj demandoj kiaj "Kiu estas en la franca hegemonio ?" estigis debatojn kaj konstatojn pri la evoluanta stato de la familio : malpli da ge-edziĝoj, partoj kiuj "patras" (zorgas pli intime pri la infanoj), kompletigo kaj interŝanĝo de la taskoj en la .../...

.../... Familio (kelkaj taskoj kaj laboroj ne restas nun aferoj de la edzino, kaj reciproke) ktp....

LE HAVRE - JARFESTO : OKAZINTA LA 13AN DE MARTO 83. : 32 partoprenantoj ĉe la bankedo. Vizito de deputito, adjunkto de la urbestro, kiu eldiris favorajn kaj helpopretajn vortojn (kompreneble !) al ni. Ĉeesto de Manjo AUSTIN prezidantino de la Brita Esperanto Asocio, kaj Amador DIAZ, prezidanto de la Esperanto Grupo de Sotono. Niaj amikoj-ĝemelitoj estas nun bone konataj de ĉiuj Samideanoj en Le Havre. Post ŝatata manĝo, Tessa produktis digestan paŭzon per klaŭnaĵoj, skeĉoj kaj deklamado de poemoj. Favore raportis la gazetaro sub taŭga titolo: "communiquer".

LA INTERNACIA MAGAZINO MONATO kiu uzas ekskluzive Esperanton, aperigis enhavon-riĉan artikolon kun fotoj kaj desegnoj pri la nova kulturcentro en Le Havre, tiel nomata "Spaco Niemeyer". La gvidkomitato de la grupo kaptis tiun oportunecon por donaci ekzemplerojn de la koncerna numero al la urbestro, deputitoj, direktoroj de la kulturcentro kaj al la urba biblioteko.... ni semu kaj semu konstante !

=====

NIA VIVO EN DOMFRONT :

Dum la Komerca kaj Distra Foiro okazinta en DOMFRONT de la 25a ĝis 28a de marto, la Organiza Komitato plej afable konsentis, en la kadro de la sonora animado, aŭdigi kantojn el diversaj E-lingvaj kasedoj. Plie, "Ouest France", inter siaj ludoj, starigis demandon, kies respondo, divenota dank'al sulice multaj flankaj detaloj, estis "Esperanto". Tiamaniere oni povis paroli multfoje pri la Internacia Lingvo, kio ŝajne malplatis al neniu. La loka grupo speciale dankas al Sro GANGNEUX, prezidanto de la Komerca Unuiĝo.

=====

1984 : ANNÉE NOUVELLE ! ET N'OUBLIEZ PAS VOTRE ABONNEMENT - COTISATION À L'UNION DES ESPÉRANTISTES DE NORMANDIE : C.C.P. ROUEN 283.40.H COTISATION MINIMUM 20 FR. , DE SOUTIEN À PARTIR DE 30 FR. À L'AVANCE, MERCI !

NIA VIVO EN YVETOT :

Prezento de Esperanto la 08.03, ĉe la asocio "Yvetot Accueil" en ĝia sidejo. Ĉirkaŭ 25 personoj ĉeestis la kunvenon. P. POTTIER priskribis la historion, kialon kaj evoluon de la internacia lingvo. Li iom post iom venigis la aŭskultantaron al la konkludo de la neceso de komuna lingvaĵo por la homaro. Poste J. GIBAUX, per diverskoloraj skribiloj ludis ĉe la tabulo por iom demonstri pri la lingvo, kio varmigis la jam simpatian etoson, kaj akiris petolajn respondojn. Sino POTTIER ekspluatatis pluen la situacion per libro-prezentado, disdono de faldfoliojn kaj diversajn materialojn. Gustumo de bis-kvitoj kaj trinko de normanda cidro plifirmigis la favoran impreson. Oni povas nur bedaŭri ke kurso ne tuj malfermiĝas post tiu agrabla kunveno, kiu cetere konsistigas jam tre favoran paŝon al estonta oportunaĵo.

=====

NORMANDA ESPERANTO BULTENO :

Via bultenisto dankas vin pro via pacienco : eĉ... jeeees ... tiu bulteno finfine aperis !!!!! "jupi" kaj transdonas la torĉon kaj taskon al nova (kaj malnova) skipo en Le Trait, Bouville, Yvetot, Le Havre ... Elkorajn dankojn al tiuj, kiuj helpis lin, ĝin eldoni, ek de la numero 29a oktobro 1974a. Ili tajpis, la stencilojn, manskribis la adresojn, redaktis, presis, multobligis, lekis la postmarkojn, gluis ilin, stampis adreson, kunigis la foliojn, agnatis ilin, pretigis la slipojn, ekspedis ĝin, verkis artikolojn ... Do, varman dankon al sinjoroj Gibaux, Guerre, Loisel, Quillaud, gesinjoroj Pottier, al ĉiuj verkist(in)oj de niaj rubrikoj kaj artikoloj, kiuj "plenigis" tiun "basikan", verdan, normandan bultenon (sed tamen nia nova bulteno ligilo), al miaj paciencoj kaj filoj, al tiuj kiuj mone subtenis nin ; fine, dankon al vi, legant(in)o ! Do, ĝis la venonta bulteno : la 148a jam ! kaj bonan kuragon al la nova bultena teamo. Pierre Lemarchand.

=====

NIA VIVO EN LA RUENA REGIONO :

Cele al 1987 (Esperanto centjara !)
16 personoj ĉeestis kunvenon la 14an
de decembro 83 (22 senkulpiĝis kaj
sendis rajtigilojn, ĉekojn, propo-
-nojn, ideojn) en Junuldomo de Rouen.
Oni decidis fondi : "Groupe Esper-
-anto - Région Rouennaise" leĝa
asocio laŭ tipo "1901" por kunigi
ĉiujn esperantist(in)ojn, esperanto
parolant(in)ojn kaj simpatiantojn
de la regiono "Agglomération Rouen
Elbeuf". Statutoj, financ- kaj agad
planoj estis diskutitaj kaj ankaŭ
poste studotaj.

Elektiĝis : Annie GAILLARD - Pierre
LEMARCHAND - Dominique LEROY -
Pascal MICHEL - Gunnel POULAIN.
(aĝ-mezo : 32 j.)

VENONTAJ AGADOJ :

- landa kongreso en Grand Quevilly
(Pasko 1985).
- Traduko en E^o de franclingvaj tu-
-rismaj dokumentoj kiuj aperis
pri nia regiono.
- Partopreno en la "Semajno de In-
-ternacia Amikeco" (lasta plena
semajno de februaro ĉiujare;)
- Ĝemeliĝo kun E^o-grupoj kiuj ekzis-
-tas en fremdaj urboj jam ĝemel-
-itaj kun urboj de nia Ruena re-
-giono.
- starigo de ekspozicio per paneloj
pri esperanto.
- kontaktoj kun "komunikemaj" neesp-
-erantistaj asocioj. (Kampanjo :
"SELekte INformi de U.F.E.).
- Perfektiĝo de kursfinantoj.

VENONTAJ KUNVENOJ :

Maison des Jeunes et de la Culture
Rouen Rive Gauche : 114 avenue de
Bretagne 76100 ROUEN. (apud la
komerc-centro "Saint Sever")

MERKREDE je la 19H30 precize :

- 4a de Januaro 84 : Perfektigado.
- 18a d^o : Grupa kunveno.
- 1a de Februaro : Perfektigado.
- 22a d^o : Grupa kunveno.
- 7a de Marto : Perfektigado.
- 21a d^o : Grupa kunveno.
- 18a de Aprilo : Grupa kunveno.
- 2a de Majo : Perfektigado.
- 16a de d^o : Grupa kunveno.
- 30a d^o : Perfektigado.
- 13a de Junio : Grupa kunveno.
- 27a d^o : Perfektigado.

= do la 4an de januaro ni komencos
traduki kune turismajn dokumentojn
pri Rouen kaj Seine Maritime.

=====

" ARGUMENTAIRE " :

*Vous trouverez ci joint " un argu-
-mentaire " intitulé : "La communi-
-cation et les problèmes linguisti-
-ques dans les relations inter-peu-
-ples. / L'Espéranto, la langue pla-
-nifiée à vocation internationale."
C'est un condensé de documents édi-
-tés par l'U.F.E., Sat Amikaro, le
"Kultura Centro Esperantista" de La
Chaux de Fonds (Suisse) etc...
Ces textes ont pour auteurs : Henri
Masson, Olivier Tzaut, Claude Gacond
Claude Piron, Michel Duc Goninaz,
Pierre Janton, Gian Carlo Fighiera
(Texte en E^o.) etc...*

*Où ils soient ici remerciés pour
ces très larges "emprunts".
Nous vous le proposons comme canevas
de base, pour un exposé d'information
destiné à un public non espérantiste
Il va de soi qu'il devra être com-
-plété, remanié, en fonction du
public rencontré, en particulier
en ce qui concerne:*

*les paragraphes : "Emploi de l'E^o"
"Utilisations pratiques", "Bibli-
-ographie", etc... :*

*(Présentation de livres, brochures,
journaux, documents, dépliants com-
-merciaux et touristiques, disques,
cassettes, annuaires, timbres-poste
photographies, diapositives, pan-
-neaux d'exposition, etc....)*

*Nous vous en souhaitons bon usage.
Pour toute remarque, complément,
critique, s'adresser à Pierre Lemar-
-chand, 43 rue Desseaux 76100 Rouen
en particulier pour les conclusions
tirées suite à son emploi lors
d'exposés, rédaction d'articles etc..
à l'avance merci !*

=====

NI FUNEBRAS :

*Kun granda malĝojo, oni sciigis
al ni la forpason de la edzino
de nia amiko France Guerre (Rouen).
Ni neniam forgesos tiun afablan,
gentilan virinon, kiu ĉiam plej
bone kaj ĝentile akceptis nin
ĉe sia . Estas granda bato
de la . La sorto por nia amiko.
Elkorajn sentojn, amiko nia, de
viaj ĝemikoj.*

=====

L'ESPERANTO : UN DROIT À LA
COMMUNICATION !

 ** LA COMMUNICATION ET LES PROBLEMES **
 ** LINGUISTIQUES DANS LES RELATIONS **
 ** INTER - PEUPLES. **

 ** L'ESPERANTO : LA LANGUE **
 ** PLANIFIEE A VOCATION **
 ** INTERNATIONALE. **

1/7

" Le problème des langues et de la communication entre les peuples est un problème majeur et actuel, car la solution de tous les grands problèmes mondiaux est liée à une communication internationale démocratique, qualitative et quantitative. "

* LES ECHANGES ENTRE LES PEUPLES :

- 1) MULTIPLICITE ACTUELLE : dans de très nombreux domaines :
 - information / Mass-médias.
 - commerce / industrie.
 - sciences / techniques / Recherche.
 - organisations internationales / politique.
 - moyens de communication.
 - tourisme / voyages / loisirs.
 - culture / sports.
 - économie / marché du travail : travailleurs migrants.
- 2) ECHANGES ACROUS A L'AVENIR : en raison du progrès des techniques.

* LA CONFUSION ACTUELLE :

- 1) DANS LE MONDE :
 - environ 3500 langues / 9000 dialectes.
 - nationales
 - régionales
 - locales
 - de relation = pidgins, créoles, sakins, chinook...
 - techniques
 - dialectes sociaux = jargons, argots ...
- 2) EN EUROPE :
 - plus de 120 idiomes.
- 3) EN FRANCE :
 - 1 langue officielle = le Français.
 - 7 langues régionales = alsacien, Basque, Breton, Catalan, Corse, Flamand, Occitan.
 - de très nombreux dialectes locaux, "patois".
 - des parlars sociaux et techniques
 - les langues maternelles des travailleurs immigrés des réunies et de leurs familles.

* LE PROBLEME LINGUISTIQUE : c'est :

- 1) CRISTE DANS L'ENSEIGNEMENT DES LANGUES :
 - Rapport "Pierre Bédoux" sur l'enseignement des langues vivantes de mai 1981.
- 2) SURMENAGE SCOLAIRE
- 3) DEPENDANCE linguistique / culturelle = économique / politique des peuples en voie de développement.
- 4) BUREAUCRATIE : - traduction
- 5) COÛTS : - interprétation
- 6) ATQUEEMENTS MINORITES linguistiques et culturelles.
 - dialectes et patoisants.
 - Belge, Canada, Inde, Afrique Noire
- 7) CONELLIS - Belgique, Canada, Inde, Afrique Noire
- 8) COÛTS - GASPILLAGE
 - en temps, efforts, argent, et énergie.
 - Le chaos linguistique se en s'aggravant....

.../...

.../...
* SOLUTIONS ENVISAGEES DANS L'ETAT ACTUEL DU PROBLEME :

2/7

1) PALLIATIVES :

- codes internationaux :
 - chiffres
 - notes de musique
 - codes
 - signes
 - symboles
 - signaux
 - alphabets (Braille, Sourds-muets, Morse...)
 - ideo/picto/grammes.
- normalisation internationale :
 - poids et mesures (système M.K.S.A.).
 - chimie
 - sciences, techniques, technologie, terminologie...
- ce ne sont pas des systèmes linguistiques complets.
- ils ne solutionnent que partiellement le problème.
- ils ne sont pas des langues capables d'exprimer toutes les nuances de la pensée et du sentiment.

2) INTERMÉDIAIRES :

- humains : interprètes - traducteurs.
- machines : à enseigner les langues/laboratoires de langues (auxiliaires pédagogiques).
à traduire : efficacité limitée même à l'avenir.
- ce ne sont que des intermédiaires; il manque un langage, un contact d'homme à homme.

3) ENSEIGNEMENT DES LANGUES :

- langue de base, minimum : "Basic English" : a échoué.
- langue "morte" : latin : ne répond plus aux impératifs de la vie moderne.
- langue nationale : de grande diffusion : LAQUELLE ?
Danger de la suprématie d'une langue tant sur le plan culturel, qu'économique et politique.
ne présentant aucun risque de pression politique, économique, culturelle (ex.: Romanche, Islandais) ces tentatives ont échoué.
- bi/tri/linguisme - Polyglottisme : réservés à une élite et finalement, prédominance d'une langue sur les autres.
- crise et surmenage dans l'enseignement des langues, malgré les méthodes pédagogiques modernes.

"Les sociétés humaines investissent des millions d'heures et des milliards de francs, pour que des millions d'enfants, dans le monde entier, apprennent les langues. Cet investissement est si efficace que lorsque ces enfants sont devenus adultes, les mêmes sociétés investissent de nouveaux millions dans la traduction, l'interprétation, le secrétariat multilingue et la reproduction de documents et d'ouvrages dans des dizaines de langues.

Un système où des millions et des millions d'enfants passent environ 1500 heures de leur vie à attaquer des barrières linguistiques, qui sont si peu entamées par cet énorme déploiement d'énergie, qu'il faut chaque année dépenser des milliards de francs pour les contourner tant bien que mal, est un système qui fonctionne mal."

* BILAN DES SOLUTIONS ACTUELLES : Ces solutions :

- 1) INCOHÉRENTES.
- 2) DISCRIMINATOIRES.
- 3) Sources de GASPILLAGES en : Temps - Argent - Energie - Efforts.
- 4) INADAPTEES à une époque qui se veut "moderne".

* LA SOLUTION D'AVENIR : La solution la plus :

- 1) RATIONNELLE
 - 2) ÉCONOMIQUE
 - 3) SATISFAISANTE :
- est de donner la priorité à une LANGUE COMMUNE pour CHAQUE HOMME en plus de sa LANGUE MATERNELLE. Mais quelle langue choisir ?

.../...

.../...

* CRITERES DE CHOIX POUR UNE LANGUE INTERNATIONALE :

Pour un poste unique à pourvoir, lorsqu'il y a plusieurs candidats, on fait un choix entre les candidats, et pour cela on définit des critères de choix. :

- | | |
|-----------------|---------------|
| 1) NEUTRALITE | 2) SIMPLICITE |
| 3) REGULARITE | 4) CLARTE |
| 5) PRODUCTIVITE | 6) STABILITE |
| 7) HARMONIE. | |

Dans les candidats précédemment cités, aucun ne remplit d'une façon satisfaisante l'ensemble des critères.

C'est pour cela que l'on a proposé une autre solution :

UNE LANGUE PLANIFIEE : L' E S P E R A N T O .

* CE QU'EST L' ESPERANTO : c'est :

- 1) LA LANGUE PLANIFIEE à vocation internationale.
- 2) Prévue pour la COMMUNICATION ENTRE LES PEUPLES, pour rompre les barrières linguistiques.
- 3) les BASES de la langue datent de 1887 (bientôt centenaire). elles sont parues en Pologne. Leur initiateur est L.L.Zamenhof.

* DE QUOI EST-ELLE CONSTITUEE ? c'est :

- 1) une SYNTHESE des principaux types de langues.
- 2) sa STRUCTURE INTERNE correspond aux langues agglutinantes : (ex. : Turc, Japonais, Hongrois, Finnois...)
- 3) ses RACINES sont choisies en fonction du degré d'internationalité parmi les racines des langues flexionnelles du groupe indo-européen. (langues gréco-latines, anglosaxonnes, slaves ...)
- 4) ses ELEMENTS INVARIABLES se combinent entr'eux pour former des familles de mots complètes, comme dans les langues isolantes : (ex. : Chinois, Malais, Malgache).
- 5) son OSSATURE GRAMMATICALE est sans exception. d'où une assimilation et une maîtrise rapide de la langue. :
 - alphabet phonétique : pas d'orthographe.
 - la place de l'accent tonique ne pose pas de difficulté : toujours sur l'avant dernière syllabe.
 - ossature grammaticale sans exception. 16 règles de base.
 - formation, régulière, logique des :

- substantifs	- famille de mots	- numération
- pluriels	- superlatifs	- comparatifs
- féminins	- pronoms	- adjectifs
- contraires	- corrélatifs	- adverbes ...
 - combinaison des affixes + des éléments de base.
 - identification immédiate de la fonction grammaticale des mots dans la phrase.
 - pas de verbes irréguliers.
 - 12 terminaisons verbales, régulières et invariables.
 - un seul auxiliaire.
 - un participe futur.
 - inexistence des homonymes et idiotismes.
 - une très grande souplesse dans la construction des phrases.

* CARACTERISTIQUES :

Lorsque l'on reprend la liste des critères définis préalablement, sur les PLANS :

- | | |
|---------------------|-------------------|
| - 1 - social | - 2 - relationnel |
| - 3 - linguistique | - 4 - pédagogique |
| - 5 - psychologique | - 6 - culturel |
| - 7 - économique, | |

L'ESPERANTO répond aux impératifs demandés à une langue de communication mondiale.

.../...

c'est une langue :

1) NEUTRE :

- 1 - : indépendante de toute idéologie.
- 2 - : qui n'appartient à aucun peuple en particulier: *elle demande la même démarche pour tous : apprendre cette langue à côté de sa langue maternelle.*
- 3 - : utilisée par des personnes très diverses : *de toutes conditions, origines, opinions, sur tous les continents.*
- 4 - : elle écarte le risque d'hégémonisme culturel, linguistique
- 5 - : elle sauvegarde les valeurs culturelles de toutes les langues : *même dialectales et patoisantes.*
- 6 - : elle est vraiment "internationale" par :
 - son lexique
 - sa phonologie
 - sa grammaire
 - sa structure.
- 7 - : elle permet donc une meilleure égalité des chances dans l'étude et l'utilisation des langues.
c'est un facteur de justice.

2) SIMPLE :

- 1 - : facile d'étude et d'utilisation.
- 2 - : permet l'aisance dans l'expression, et ceci rapidement.
Malgré cette simplicité :
" l'Esperanto est en mesure d'exprimer toutes les nuances les plus subtiles de la pensée et du sentiment." Maurice Genevoix.
C'est la langue qui fait le moins appel à la mémoire, et le plus à l'intelligence.

3) RÉGULIÈRE :

- 1 - : logique.
- 2 - : pas d'exception aux règles.

4) CLAIRE :

- 1 - : précise
- 2 - : concise
- 3 - : homogène
- 4 - : cohérente *permettant :*
- 5 - : une grande fidélité dans la traduction, *et d'excellente*
- 6 - : qualité pour la communication.

5) PRODUCTIVE : *d'un excellent :*

- 1 - : rendement dans son étude. *elle demande :*
- 2 - : un investissement minimal (*temps, efforts, énergie*), grâce
- 3 - : à sa formation multiplicative des mots.
- 4 - : à sa dérivation, composition complètes et riches. *d'où*
- 5 - : une rapidité d'assimilation, quelque soit la langue maternelle. *enfin elle est :*
- 6 - : immédiatement applicable : *ce n'est plus un projet.*
- 7 - : c'est un puissant facteur de motivation et de créativité.

6) STABLE : *elle a subi :*

- 1 - : *l'épreuve du temps* (bientôt centenaire) 1887 / 1987.
- 2 - : mais elle évolue, en fonction du progrès des sciences et des techniques par l'enrichissement de néologismes, par son emploi dans toutes les branches de l'activité humaine.

7) HARMONIEUSE : *cette langue est en outre :*

- 1 - : expressive, *car :*
- 2 - : riche en voyelles,
- 3 - : son accent tonique est agréable: (*ressemble à l'Italien "accent chantant".*)
- 4 - : souple d'emploi, *par sa structure agglutinante*
L'ordre des mots est affaire et isolante.
de style: plutôt que de grammaire.

* L'EMPLOI DE L' ESPERANTO :1) SON ENSEIGNEMENT :

- 1 - Associations espérantistes locales et nationales.
- 2 - Autodidactes : en France : méthodes ASSIMIL, MARABOUT FLASH.
- 3 - à l'énéficié d' Expériences pédagogiques
en Grande Bretagne, Finlande, Suisse, Hawaï, U.S.A., Belgique, Hongrie, R.F.A. : Institut de Pédagogie Cybernétique de Paderborn : pour un Français 176 heures d'espéranto = 1500 h. d'anglais ou 2000 h. d'Allemand, pour le même niveau de connaissance. Connaissance passive de l'Espéranto = environ 20 heures d'étude.
- 4 - à titre officiel : dans plus de 80 universités dans le monde.
en France : Clermont Ferrand - Aix en Provence - Rennes II (Unités de Valeur). Dans le cadre des "activités socio-culturelles": enseignement secondaire. Dans tous les établissements secondaires à titre facultatif de Hongrie, Estonie, Norvège, Bulgarie, Serbie, Chine Populaire, Brésil, Nouvelle Zélande, Pays Bas, Pologne
- 5 - en France: Proposition de Loi n°1550 Assemblée Nationale et n°67 du 4/11/80 au Sénat. (Introduction matière à option)
- 6 - c'est un auxiliaire pédagogique pour un enseignement d'orientation linguistique, qui
 - facilite l'étude d'autres langues et d'autres matières scolaires,
 - permet d'approfondir l'étude de sa langue maternelle d'où une réelle valeur pédagogique.*C'est la seule langue étrangère que l'on puisse maîtriser dans le temps normal de la scolarité.*

2) POSSIBILITÉS OFFERTES PAR SON EMPLOI : grâce à l'espéranto, on peut :

- 1 - acquérir une culture mondialiste : connaître les chefs-d'oeuvres littéraires des langues de grande diffusion, mais aussi des langues de diffusion restreinte (Près de 20.000 ouvrages édités) -
*lire des ouvrages originaux, directement écrits en Espéranto
écouter des émissions de radio : Wien, Rio de Janeiro, Pekin, Rome, Zagreb, Varsovie, Vatican, Sorocaba....
des disques et cassettes,
choisir une lecture d'actualité : 100 titres de périodiques*
- 2 - correspondre dans le monde entier :
 - services échange d'adresses , annuaires des associations
 - jumelages, échanges inter-scolaires / groupes,
- 3 - voyager dans tous pays :
 - séjours, hospitalité facilités,
 - rapports directs, sans intermédiaire
 - ambiance internationale : centres de séjour, de vacances
- 4 - participer à : des rencontres *après sans interprète*
(environ 12.000 congressistes , en = 150 rencontres internationales.)
- 5 - échanger des idées et informations de tous ordres:
 - directement ou par l'intermédiaire d'associations internationales professionnelles et de groupements d'affinités.
- 6 - rendre plus agréables et développer les loisirs :
 - radio-amateurs, philatélie, camping international, collections, échanges divers ...

.../...

* L'ESPERANTO ET SES UTILISATIONS PRATIQUES :

- 1) L'Espéranto n'est plus un projet mais une LANGUE VIVANTE, COMPLÈTE, IMMÉDIATEMENT UTILE.
- 2) LA LISTE DES ORGANISMES de tous ordres, qui plaident en sa faveur, et : ou qui l'utilisent, ne cesse de s'allonger :
 - O.N.U. - U.N.E.S.C.O. (8ème conférence générale: 1954 Montevideo : résolution qui reconnaît la valeur de l'Espéranto dans les échanges intellectuels internationaux.)
 - O.M.S. - Union Postale Universelle : (depuis 1921 : langage clair dans les PTT.)
 - Organisation Mondiale du Tourisme : résolution favorable lors de la Conférence Mondiale du Tourisme : Manille 9/10/30.
 - Ministères
 - Firms Commerciales : Fiat, Agfa, Intercontainer, Philips
 - Compagnies chemin de fer et aviation
 - Offices de tourisme, Foires : près de 3000 dépliant.
 - Organisations, publications scientifiques.
 - Partis politiques, Syndicats,
 - Mouvements divers : Scouts, Amnesty International, Amis de la Nature, Citoyens du Monde,
 - Coopératives,
 - Stations de radio : Wien, Pékin, Vatican, Zagreb, Rome, Varsovie, Rio de Janeiro, Bern, Sorocaba... radios "libres"
 - Communautés Européennes : étude de traduction automatique (Espéranto langue pont) par le "Buro voor Systeemontwikkeling" déjà 250.000 dollars d'investis. Proposition "Glinne" devant le Parlement Européen.
 - de nombreuses villes ont donné le nom de Zamenhof ou d'Espéranto à des rues ou places publiques, reconnaissant par ce geste l'utilité d'une langue internationale commune et la valeur de l'Espéranto.
- 3) Tous ces faits confirment l'existence d'un PUBLIC ESPERANTOPHONE SUFFISAMMENT VASTE POUR JUSTIFIER L'UTILISATION de cette langue sur les ONDES, et dans divers domaines de la VIE PRATIQUE de tous les jours.

* UNE NOUVELLE DIMENSION À LA COMMUNICATION : L'espéranto vise :

- 1) Supprimer le chaos qui règne actuellement dans les relations linguistiques internationales, sans vouloir supprimer les autres langues.
- 2) Il fournit un instrument neutre de communication : en facilitant contacts, dialogues, échanges directs,
 - débarrassé des difficultés des autres langues,
 - c'est un outil rationnel qui correspond au prodigieux développement des moyens modernes de communication et qui leur donne une nouvelle dimension.
- 3) il sauvegarde la valeur culturelle de toutes les langues : nationales, régionales, dialectales, dialectales, voisantes, il permet à tous les peuples de garder leur identité, parce qu'aucune langue ne mérite l'oubli.
- 4) il protège ces langues de leur interpénétration réciproque : jargon = "franglais".

.../...

.../...

7/7

- 5) outre ce moyen de communication, c'est :
- un puissant facteur d'émancipation, de progrès social,
de paix, car c'est :
- un trait d'union entre les peuples,
- une communauté mondiale d'échanges et d'amitié,
- 6) c'est une porte ouverte sur tous les peuples et toutes les cultures,
- il est donc au service de la libre circulation des hommes et des idées.
- 7) coordonné entre les Etats, l'enseignement de l'Espéranto permettrait une utilisation beaucoup plus rationnelle du temps, de l'argent et de l'énergie intellectuelle des sociétés humaines, sans porter le moindre préjudice à l'enrichissement culturel que représente l'acquisition d'autres langues, par ceux qui en ont le désir et ont des chances raisonnables d'y parvenir.
- L'ESPERANTO : UN DROIT À LA COMMUNICATION !

==:==:==:==:==

* BIBLIOGRAPHIE :

- QUE SAIS-JE ? Presses Universitaires de France, n° 1511
"L'Espéranto" de Pierre Janton, professeur d'Anglais et d'Espéranto à l'Université de Clermont Ferrand; 2ème édition 1977 : 16è. mille.
- MARABOUT FLASH "JE PARLE ESPÉRANTO" n° 345. Jean Thierry.
- ASSIMIL "L'Espéranto sans peine". Livre, disques, bandes magnétiques, cassettes. Jean Thierry.
- EDITIONS OPHRYS "Vocabulaire Espéranto". de Michel Duc Goninaz
Professeur de Russe et d'Espéranto à l'Université d' Aix en Provence.

==:==:==:==:==

" HOMOJ VIVANTAJ EN TEMPOJ DE RAPIDEKO KAJ DE MONDPROBLEMOJ
" Des hommes vivant à l'ère de la vitesse et des problèmes

NE PLU ATENTAS SENTIMENTALAJN ARGUMENTOJN.
mondiaux, ne sont plus sensibles à des arguments sentimentaux.

ILI KONVINKIGAS NUR, SE ONI PROPONAS AVANTAGOJN.
Ils ne se laissent convaincre que, si on propose des avantages.

ESPERANTO NE PROPONAS AL LA MONDO PLIAJN IDEALOJN, SED SIMPLE
L'Espéranto ne propose pas au monde de nouveaux idéaux, mais

SOLVON DE LA LINGVA ĤAOSO, KUN SEKVA NEKALKULEBLA EKONOMIO DE
simplement la solution du chaos linguistique, avec par conséquent

TEMPO, GAJNO DE EKZAKTECO KAJ DEFENDO DE LA NACIAJ KAJ REGIONAJ
une incalculable économie de temps, un gain en exactitude et la

LINGVOJ, KONTRAŬ LINGVAJ DISKRIMINACIOJ
défense des langues nationales et régionales, contre les discriminations linguistiques.

ĜI FINE, ALPORTAS AL LA HOMARO FUNDAMENTAN BAZON, SUR KIU EBLAS
Il apporte enfin à l'humanité, une base fondamentale, sur laquelle

EFEKTIVIGI SOLIDARECON KAJ MORALAN UNUECON INTER LA POPOLOJ."
il est possible de réaliser la solidarité et l'unité morale des peuples."

Gian Carlo Fighiera.